Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

20-a Jarkolekto * Aprilo 2003 * N-ro 70

ISSN 1576-0618



FRIGILIANA, unu el la lastaj maŭraj vilaĝoj en Andaluzio.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Armengual de la Mota 33, 4-D, 29007 MÁLAGA.
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: La Reprografía, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 MÁLAGA, esperanto@ciudadfutura.com)
José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ (esperanto14@supercable.es)
COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ, José Antonio VALVERDE MARTÍN

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio. 3
Bonvenon *Jaena Esperanto-Asocio*.....5
Ni Piediru Surpiede.....6
Kiel Córdoba fariĝis Kordovo 9
Esperanto kiel Ilo de Daŭropoveco en Globaliĝa Mondo 12
Blank - Nigre.....14
Dialogoj kun Mia Edzino 15
Deklaro de la Esperanto Civito okze de la Iraka milito .18
Interlingvistiko: *Frater*.....20
Paĝoj pri nia Historio 24
Poezia Angulo.....26
Andaluza Kuirarto.....27
Flamenko.....28
Turismi en *Frigiliana*.....29
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio 31
Komercaj Reklamoj.....32

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



* Ni komencas ĉi tiun unuan paĝon de la revuo kun tre agrabla novaĵo por la esperanto-movado, la pasintan 14an de aprilo naskiĝis oficiale en Jaeno la Kultura Asocio "JAENA ESPERANTO-ASOCIO" kies celo estas renkontigi la esperantistaron de ĉi tiu andaluza urbo kaj disvastigi la internacian lingvon en Jaeno.

Antaŭ kelkaj monatoj grupeto da junaj esperantistoj de la urbo Jaeno, dank´al la iniciato kaj konstanta propagando de nia samideano Paŭlo FOĈE kreis la Jaenan Esperanto-Klubon, kun virtuala sidejo en Interreto, kiu estis la kerno de la asocio kiu naskiĝis antaŭ kelkaj tagoj. La agado de tiu grupeto estas senlaca, ili propagandas la lingvon konstante en universitataj medioj kaj en alternativaj asocioj de Jaeno.

Nun, ili planas kontakti kun la respondeculoj de la Popola Universitato de Jaeno por atingi fizikan ejon kaj se eble, organizi estontece kurson de la internacia lingvo. Kompreneble ili jam ricevis help-oferojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Same, el ĉi tiu paĝo ni sciigas al ĉiuj geesperantistoj de Jaeno ke oni disponas pri TTT-paĝo en Interreto kie vi povos kontakti kun la ĵus-naskita asocio. Gratulojn Jaenanoj kaj ĉiam antaŭen.

Adreso de la Jaena Esperanto-Asocio ĉe Interreto:
http://www.esperanto-jaen.tk

JAENA ESPERANTO-ASOCIO
ASOCIACIÓN JIENNENSE DE ESPERANTO

* La pasintan 1an de novembro forpasis en Kordovo José ARNAL NAVARRO. Pepe ARNAL estis katedriisto pri Beletro en la Pedagogia Fakultato de la Universitato de Kordovo kaj amiko de la internacia lingvo de antaŭ multaj jaroj. Li ĉeestis kurson de esperanto organizita en la jaro 1984 kaj li iomete kunlaboris en la organizado de la tiujara tendaro de la Hispana Esperantista Junulara Societo, okazinta en Kordovo. Li eĉ dezajnis afiŝon por tiu junulara renkontiĝo, kvankam la dezajnon finfine oni ne eldonis malgraŭ la oficialaj promesoj.

Pepe ARNAL estis tre konata en la kulturaj agadoj en Kordovo, li estis aktiva membro de la teatra ĥoro kaj organizanto de kursoj pri pentrarto en kulturaj asocioj de la urbo. Li aliĝis tuj al la Kordova Esperanto-Asocio post ĝia fondiĝo kaj tre amuzaj estis liaj dialogoj kun aliaj lernantoj de la internacia lingvo pri la origino de la vortoj en esperanto. Ankaŭ konata estis lia aŭtomobilo portanta grandan verdan stelon sub la devizo "Esperanto, bona ideo". Pace ripozu, amiko Pepe ARNAL.

* La pasintan 29an de aŭgusto 2002 forpasis en Kordovo Diego RUIZ HERRERO. Diego RUIZ estis prestiĝa tribunal-prokuristo en tiu andaluza urbo kaj li verŝajne estis la sola tiea esperantisto dum la 50a kaj 60a jardeko, tiel, lia nomo aperas ofte sur la paĝoj de la tiutempaj hispana revuo *BOLETÍN*. Tamen, ŝajne li jam ĉesis kiun ajn kontakton kun la E-movado dum la 70a jardeko, kaj eĉ li neniam kontaktis kun la Kordova E-Asocio aŭ kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Li pace ripozu, ĉi tiu antikva samideano.

* Fine de la pasinta monato januaro vizitis Andaluzion Robert VON DEM BORNE, li estas Prezidanto de Nederlanda Esperanto-Junularo. Li venis en Malagon kaj poste li vizitis Granadon. En Kordovo li kontaktis kun la tiea UEA-delegito kaj poste li vojaĝis en Madridon, kie li ĉeestis la Zamenhofan Feston, organizita de la *Liceo Madrileño de Esperanto*.

* Dum la venonta somero, samtempe al la okazigo de la Universala Kongreso de Esperanto en Goteburgo (Svedio), aperos la 7a numero de la revuo *Jura Tribuno Internacia*, oficiala organo de Esperanta Jura Asocio kaj eldonita kun la kunlaboro de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Inter la enhavo aperas eseo pri la laboro kaj la protektado kiun meritas la ĵurnalistoj dum la militaj konfliktoj laŭ la Internacia Juro.

BONVENON *Jaena Esperanto-Asocio* !

Ekde kiam en la jaro 1.984 naskiĝis Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, unu el siaj ĉefaj taskoj estis disvastigi la internacian lingvon tra la tuta Andaluzio. Tiuj jam ekzistantaj oficialaj grupoj de Malago, Sevilo kaj Kordovo ĉiam revis helpi la naskiĝon de asocioj en Almerio, Hŭelvo, Granado, Kadizo kaj Jaeno. Tamen, sciate, ke se oni deziras atingi tiun revon oni devas adicii al la malfacila tasko disvastigi nian lingvon la laboregon krei, organizi kaj funkciigi asocion, kaj ĉi tio lasta ja estas peza laboro ĉu rilate E-asociojn ĉu alispecajn organizojn.

Do, tiel ni en la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo plenĝojiĝas pro la fakto, ke la pasintan monaton aprilon naskiĝis oficiale la Jaenan Esperanto Asocion, kiel rezulto de la laboro ĉefe de du junuloj, Pablo FOCHE kaj Francisco DIAZ, kiuj pripensis unuamomente renkontigi la jaenajn esperantistojn

ĉirkaŭ loko en Inter monatojn poste orga en tiu provinco. kaŭ deko da gesami al la asocio. Kom vas esti bone planita grandaj atingoj, unu ceso organizi efike lerni la lingvon kaj lingvon en kulturaj



reto, kaj kelkajn nizi oficiale la movadon Hodiaŭ, jam estas pres- deanoj tiuj kiuj jam aliĝis preneble, la laboro de— oni ne devas revi pri amomente jam estas suk la asocion, helpi aliulojn disvastigi la internacian asocioj, instruejoj aŭ aliaj

lokoj de la urboj Jaeno, Linareso kaj la cetera provinco.

Kompreneble, eĉ ne necesas diri, ke Jaena Esperanto-Asocio naskiĝas kun la tuta apogo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Do, ni bonvenigas la asocion kiu ekde la unua momento estas membro de la andaluza asocio. AEU jam sendis al JEA pakaĵon kun libroj, ĉefe libro-metodoj por faciligi la lernadon de la lingvo kaj ĝia disvastigo. Kalkulu ĉiam kun nia helpo, kompreneble laŭ niaj eblecoj, kaj sciu, ke Via laboro ĵus komenciĝis.

Espereble, la asocio de Jaeno baldaŭ estos konata pro la lingva kapableco de la membroj kaj ankaŭ pro la sukceso de ĉiuj agadoj.Ekde ĉi tie, ni invitas

al ĉiuj membroj de AEU loĝantaj en Jaeno kaj al ĉiuj simpatiantoj de la internacia lingvo kiuj loĝas en tiu provinco kontakti kun JEA, estus interese plifortigi la asocion kun novaj membroj pretaj kunlabori en la tasko disvastigi Esperanton en Jaeno.

Do, bonvenon Jaeno en Esperantion, AEU estas je Via tuta dispono.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

OLIVISTOJ Miguel Hernández (tradukis Miguel Fernández)

Andaluzoj de Jaén
olivistoj fier-staraj,
kiu igis, diru mem,
stari l'oliv-arbojn karajn ?

Ne l'nenio agis, certe,
nek la mon' nek la sinjor',
sed la tero, mute, sperte,
la ŝvitego, la labor'.

Kiuj, kune kun la pura
akvo kaj l'planedoj oldaj,
okupiĝis pri la dura
belo de la trunkoj tordaj.

Oliv-arb', ekstaru, diris
ili ĉe la bazo venta,
kaj el tero man' eliris
kun potenco fundamenta.

Andaluzoj de Jaén
olivistoj fier-staraj,
kiu nutris, diru mem,
mame l'oliv-arbojn karajn ?

Vi, per via san' fekunda,
ne l'vampiro, la bandit'
riĉiĝanta de l'profunda,
nobla vundo de la ŝvit'.

Tiu bienul' vin ĵetis
en mizeron, kun vi luktis,
viajn fruntojn li surtretis,
viajn kapojn li reduktis.

L'oliv-arbojn vi kun am'
faris sun' de vivo via,
kaj el ili fontis pan',
kiun manĝis nur alia.

Kiom da jer-centoj, kune
kun katenoj kaj olivoj,
sun-post-sune, lun-post-lune
pezas jam sur viaj vivoj !

Andaluzoj de Jaén,
olivistoj fier-staraj,
kiu rajtas, diru mem,
mastri l'oliv-arbojn karajn?

Ek, Jaén,leviĝu brave
el ŝtonaro lune svena,
tute ne kondutu sklave,
ĉar de oliv-arboj plena !

En olv-oleaj hel'
kaj aromo plej etera
atestadas pri liber'
via montetar' libera.

Opinio de la Prezidanto de A.E.U.

NI PIEDIRU SURPIEDE

Ne estas facile trovi decan kaj taŭgan solvon al la problemoj de disvastigo de nia internacia lingvo. Kutime tio okazas jen pro manko de mono, jen pro malabundo de homoj pretaj labori daŭre en la instruado aŭ/kaj en la aplikado. Ankaŭ oftas inter ni, de ĉiam, naivaj sintenoj, laŭ kiuj oni atendas (kaj eĉ esperas) ke la aliuloj, t.e. kiuj eĉ ne konas la lingvon, malaperigu niajn endemiajn malfacilaĵojn Al tio rilatas rekte la politika helpo aŭ, pli ekzakte, la konkreta kaj epizoda kunlaboro de iuj politikistoj.

Kiel sciate, de antaŭ pluraj jaroj AEU klopodas konsciigi hispanajn eŭroparlamentanojn pri la ekzisto de nia lingvo kaj pri ties evoluo kaj aplikado, kaj tiurilate mi kimarkas ankoraŭfoje ke neniel utilas rifuzi la favoran sintenon de la politikistoj. Tamen mi atentigas pri ties ĉiutaga malgrava efiko.

De tempo al tempo, al Esperantio alvenas personoj serĉantaj elstari ***per*** la lingvo sed ne ***por*** la lingvo, Inter ili troviĝas ankaŭ politikistoj. Ili konas la valoron de la esprimo *"unu homo=unu voĉdono"* kaj, tiusence, publike montras sin simpatiaj al Esperanto, se iu demandas al ili pri la afero antaŭ la balotoj. Poste, sukcesinte aŭ malsukcesinte atingi gravan postenon en la politikaj medioj, ili forgesas tute kion ili diris.

Foje, la verdan stelon oni uzas/uzis kiel ŝlosilon por eliri el malriĉaj teritorioj. Antaŭ la disfalo de la berlina muro, multaj personoj enlistiĝis en la E-kluboj de la komunismaj landoj por sin faciligi vizitojn al Hispanio, Francio, Italio... Tio plenkreskigis, ekzemple, la agadon de Monda Turismo. Nun, post la disfalo de la berlina muro, la turismo akiras novan dimension kaj jam la E-entrepreno ne estas bezonata.

Kiel diras Giorgio Silfer en FENIKSE (Heroldo de Esperanto, 22 septembro-13 oktobro 2002) "simile povas okazi morgaŭ aŭ postmorgaŭ kun alispecaj entreprenoj , naskitaj el kompromisoj kun la tiama ekonomia reĝimo, kiam la verda stelo povis kaŝi profitan celon". Mi aldonus: *ĉar en Esperantio ankoraŭ ne maturiĝis la konscio de la aplikado de la lingvo.*

Interna Ideo kiel baza koncepto; **neŭtraleco**, kiel demokratia valoro; **ekonomia ŝparo**, kiel ilo por allogi niajn pragmatistajn samtempulojn. Jen la pilierojn de la bezonata strategio. Jen efikajn kaj neprajn argumentojn disvatigendajn inter kaj ekster ni.

Andrés Martín González

Helpu la Esperanto-Movadon en Andaluzio !
Aniĝu al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.


Sendu leteron en nian adreson kaj enmetu la ĉi-jaran kotizon, 15 eurojn, en unu el la subaj banko-kontoj.

BBVA: 0182 3361 34 0207160711
Caja General de Ahorros de Granada: 2031 0225 54 0100187657



Kiel Córdoba fariĝis Kordovo

Nia elstara samlingvano Antonio Valén estas la aŭtoro de artikolo, aperinta en *Boletín* n-ro 355 (aprilo 2002), kie li komparas kelkajn nacilingvajn vortojn kun iliaj tradukoj en esperanto. Unu el tiuj vortoj estas la loknomo "Kordovo" kaj nia amiko Valén petas pli ampleksan klarigon de ĉi tiu etimo. Nu, ĉar esperantisto kaj ĉefe ĉar kordovano mi mem provos klarigi la originon de la nomo de mia urbo *Córdoba* kaj ĝian esperantigon kiel Kordovon.



Blazono de Kordovo kiu montras la miksaĵon de kulturoj: la romia ponto, la araba norio kaj la kristana turo.

Ne eblas ĝuste fiksi la daton de fondiĝo de ĉi tiu andaluza urbo, sed tutcerte ĝi estis la loko kie sidiĝis ibera tribo. Alvenis poste turduloj kaj turdetanoj kaj, en la jaro 206 a.K., la legioj de la pretoro Lukio Marko, kiuj, enirinte en la iberan duoninsulon okaze de la militoj kontraŭ Kartago, konkeris la urbon. La romianoj respektis la iberan nomon *Corduba*, iuloke mi legis, ke la vorto signifas "loko kie abundas oro", tamen mi opinias, ke tio havas nenian seriozan sciencan fundamenton, ĉar neniu historiisto tion subtenas kaj pro la fakto ke la ibera lingvo ĝis nun ne estas komprenata. Tamen, ja tutcertas, ke la zono estis riĉa je mineraloj, kvankam ne oro, kaj ke ĝi estis tre grava por la komerco, ĉar ĝi estis la lasta punkto atingebla de ŝipo tra la Granda Rivero, hodiaŭ Gvadalkiviro, tiam *Betis*.

En la jaro 152 a.K. la pretoro Klaudio Marcelo ŝanĝis la situon de la urbo kaj establis ĝin pli proksime al la rivero. De tiam la urbo nomiĝis *Colonia Patricia Cordubensis*.

En la jaro 711 la araboj konkeris la urbon, kies nomo, *Corduba*, ŝanĝiĝas nur rilate al la prononco kaj skribado. De tiam la urbo estis konata kiel قُرْطُبَة aŭ *Qurtuba*. Kelkaj historiistoj preferas skribi *Kurtuba*-n, same kiel oni povas skribi hispanlingve *Irak* aŭ *Iraq*. La kutimo de la araboj estis ne ŝanĝi la nomon de la lokoj okupitaj . Ili nur arabigis la nomojn de la romiaj aŭ visigotaj urboj. Tiel, la romia *Hispalis* estis la araba *Isbiliya*, *Emerita Augusta* fariĝis *Marita*, ktp. Ne necesas diri, ke dum multaj jarcentoj *Qurtuba* estis la ĉefurbo de la araba kalifejo Al-Andaluso.

Tiuepoke la famo de la urbo atingis eĉ la lastan punkton de la okcidenta kaj orienta mondoj, kaj multaj ambasadoroj de ĉiuj regnoj vizitis la araban *Qurtuba*-n kaj la apudan urbeton *Madinat Al-Zahra*, kie loĝis la kalifo.

En la jaro 1236 la kastilia reĝo Ferdinando la 3a konkeris la urbon. Komenciĝis tiam rapida defalo de la kultura kaj politika graveco de *Qurtuba*, kiu de tiam renomiĝis *Córdoba*. Tamen, malgraŭ tiu dekadenco, la novaj kastiliaj aŭtoritatuloj respektis la arabajn monumentojn, kaj tiel la impona araba moskeo estis fiere respektata kaj eĉ fariĝis la sidejo de la kristana katedralo. Kiel dirite, la urbo renomiĝis *Córdoba*, tamen la kastilia lingvo ankoraŭ ne estis definitive formita, kaj multaj vortoj povis aperi laŭ la aŭtoro, kaj / aŭ la epoko, sub malsamaj formoj. Unu el tiuj vortoj estis la loknomo *Córdoba*. De la jaro 1.300 ĝis 1.800 ni povas trovi en malsimilaj tekstoj jen unu jen alian formon.

Tiel en 1.344 Don Diego Jiménez de Rada skribis : *e quando andava la era de los moros e ciento e sesenta e nueve años, começo este Anderrahame a fazer el fundamento para la mezquita de cordova, e ençimola en un año.* En tiu sama jarcento (la 14a) la Infanto Don Juan Manuel skribis: *entonces, porque la mezquita de cordoba no estaba acabada, añadió en ella aquel rey toda la labor que allí faltaba y acabóla.*

Same, en la jaro 1.552 la Licenciito Andrés de Torres verkis la "*Descripción de la Santa Yglesia de Córdoba*" kaj en 1.677 la Doktoro Enrique de Baca de Alfaro redaktis la "*Descripción y Noticia del templo material de la Santa Yglesia de Cordova*". Identa afero okazis rilate la familiajn nomojn. Tiel, la Granda Kapitano, milita heroo naskiĝinta en Kordovo, aperas en kelkaj verkoj kiel Gonzalo Fernández de Córdoba kaj aliloke kiel Gonzalo Fernández de Córdova.

Alia pruvo esta la kunekzisto de la toponima nomo Córdoba / Córdova en la novaj kontinentoj. Pli ol 50 urboj kun ĉi tiu nomo ekzistas tra Ameriko kaj Filipinoj, kaj apud *Córdoba* en Argentino, Meksiko, Kolombio aŭ Filipinoj, ekzistas *Córdova* en Alasko, Tenesio, Kalifronio aŭ Ĉilio. La kunekzisto de ambaŭ formoj en la hispana lingvo finiĝis komence de la 19a jarcento, kiam definitive *Córdoba* oficialiĝas kiel la nomo de la urbo, kvankam la familia nomo *Córdova* ankoraŭ ekzistas, ekz. en multaj nobelaj titoloj kiel ĉe la Duko de *Feria* kiu nomiĝas Fernández de Córdova.

Rilate aliajn lingvojn, la adopto de la toponomia nomo de la urbo okazis en la okcidentaj lingvoj post la konkero de la urbo fare de Kastilio. Do, la nomo Kordovo en la lingvoj angla, franca, itala, germana... ne devenas rekte de la romia originala etimo, sed de tiu kastilia. Ĉi tiel, en preskaŭ ĉiuj okcidentaj lingvoj la formo uzata por nomi la urbon estas tiu kun finaĵo AV,

ekz. angle *cordova*; france *cordoue* ; itale *cordova* ; germane *kordova*...

Kompreneble, la araba lingvo daŭre uzas la nomon arabigitan de la al-andalusa kalifa urbo, t.e. *Qurtuba*.

Rilate internaciajn lingvojn, krom en esperanto, mi trovis la nomon de la urbo nur en Ido: *Kordova* kaj en Interlingua *Cordova*.

Kaj en esperanto? Nu, organizita e-movado ekzistas en ĉi tiu urbo jam en la jaro 1.910. Mi ne posedas, nek ĝis nun mi vidis tiutempan dokumenton kun la nomo de la urbo esperantigita. Sur E-revuoj, ĉefe en "Esperanto", la urbo aperas okaze de prelegoj kaj kursoj, kaj ĝi ĉiam estas nomata *Cordoba*. En 1.919 sur dokumento pri la movado en Andaluzio aperas kiel *Cordobo*, tamen ĉi tiu vorto, laŭ la esperanta fonetiko, tute ne rilatus kun la originala kastil-lingva formo.

Sur la unuaj eldonoj de la librometodo "*Esperanto al Alcance de Todos*" de Fernando Soler aperas, ene de ĉapitro rilata al leteroj, jena teksto *Cordoba 31 januaro 1910*, sed post kelkaj eldonoj la aŭtoro anstataŭigis la frazon per *Kordovo 31 januaro 1910*. Ankaŭ, en la jaro 1.924 la E-grupo de la urbo oficiale nomiĝis "Esperantista Grupo Kordova", kaj unu jaron poste en 1.925 la formo "Kordovo" aperas multfoje okaze de la 3a Iberia Kongreso de Espranto kiu okazis en la urbo.

Sendube, en la nomigo de la urbo kiel Kordovo, anstataŭ Kordobo, multe influis la fakto ke en la plejmulto de la lingvoj sur kiuj baziĝas esperanto, oni uzas la formon VO-n anstataŭ BO-n. Same okazis rilate aliajn urbojn, ekzemple la aragona *Zaragoza* aperas en la unuaj jardekoj de la disvastigo de esperanto kiel *Saragoso* konforme al la formo *Saragossa* en la franca, angla kaj germana lingvoj kaj *Saragossie* de la pola lingvo. Ankaŭ la portugala Lisbono, kies originala portugala nomo estas *Lisboa*, sekvas en esperanto aliajn formojn devenintaj de la angla *Lisbon*, la franca *Lisbonne*, la germana *Lisbon* aŭ eĉ la pola *Lizbona*.

Post la intercivitana milito la Esperanto-movado suferas jardekojn da silento en Kordovo. Do, la nomo de la urbo preskaŭ ne aperas en la revuoj. Tamen, kiam tio okazas, ĝi ĉiam aperas sur la originala formo *Cordoba*, kvankam okaze de la Kongreso de Esperanto okazinta en Malago en la jaro 1.959 oni mencias la urbon kiel *Kordobo*. En la jaro 1.81 naskiĝis junulara grupo ĉe gimnazio de la urbo, bazo de la nuntempa E-movado de Kordovo, kaj post komuna decido oni aprobis uzi la vorton Kordovon por respekti nian historion kaj akorde al la Plena Ilustrita Vortaro, kie aperas la vorto kun la jena difino: *nomo de pluraj urboj, i.a. de hispana ĉe Gvadalkiviro*. Kiel kuriozaĵo oni povas diri, ke oficiale en la Esperanto-Movado ekzistas du asocioj kun preskaŭ identa nomo, la "Kordova Esperanto-Asocio" en Andaluzio kaj la "Kordoba Esperanto-Asocio" en Argentino, du asocioj kun samaj celoj,

preskaŭ egalaj nomoj kvankam miloj da kilometroj inter ili.

José María Rodríguez Hernández
kordovano kaj esperantisto

ESPERANTO KIEL ILO DE DAŬROPOVECO EN GLOBALIĜA MONDO

D-ro med. W. Gunther.

Nia epoko de la globaliĝo estas globaligo laŭ la neoliberala doktrino de laŭeble plej deregulta merkato. La paca, demokratia kaj homrajta ĝiskonsumo de la Planedo okazas kiel universale akceptita "diktaduro de la profito". En ĉi kadro efektiviĝas la eterne "natura" aŭtomatismo de "Kies panon mi manĝas, ties kanton mi kantas". Demokratia dulingveco pro lingva demokratio ne estas ĝenerale projektata, evidente ĉar ne ekzistas ajna iel universale sentebla bezono: "mondo sen Esperanto ne estas katastrofo", tiel dire, kaj pere de la superrega Angla-Usona ĉio bone solviĝos...

Tamen estas du kampoj de nacia kaj internacia kunvivado-kunagado, kiuj decide efektivgas kaj garantias pacon, demokration kaj la Homajn Rajtojn. Estas ĉi-tiuj, unue, jam delonge, la sociala justeco kaj due, nuntage kaj ĉiam pli grave, la daŭropoveco aŭ daŭropova evoluigo (Angle: *sustainability*, Germane: *Nachhaltigkeit*). Oni bone notu, ke eĉ la transmetata mono de la deregulita merkato ĉefe estas mono, farita en regionoj kun relative stabila sociala paco. La politiko nomas tiujn du kampojn ankaŭ sociala kaj ekologia aŭ solidara aŭ solida. Celo estas la komuna bono.

Ĉirilate elreliefiĝas novaj argumentaj kriterioj por Esperanto kaj lingva demokratio. Kadre de globaliĝe difinitaj justeco kaj daŭropova evoluo Esperanto estas esenca parto de lingva demokratio. Ĝi konceptiĝas kiel ĉefa ilo de sociala justeco kaj daŭropova evoluo pro siaj (imanente) porvivaj ecoj. En la kampo lingva de internacieco Esperanto taŭgas pli multe ol ĉiu etna lingvo, aparte ankaŭ pli multe ol la Angla, pro

- kultura informado-kompreniĝado sur minimumo da egoismoj (riskoj) sen perdo de memidentecoj, t.e. pro sia aktiva neŭtraleco per demokratia dulingveco (kvalita aspekto) kaj

due, sia daŭropoveco en la reduktado de inter-etna, -nacia, -kultura informado-kompreniĝado je ĝia esenca minimumo sen perdo de (lingva) kompetento, t.e. pro sia aktiva maldisipado per primateriala ŝparpovo (kvanta aspekto).

Necesas ĉi konscio kaj konscienco koncerne de la daŭropoveco en Esperanto por peri ĝin pli sukcese kadre de la globaligo. Esperanto ja estas neŭtrala lingvo por ĉiuj, sed ne nur kiel politike eleganta kaj kulture interesa "hobio", sed kiel pruveble plej taŭga internacia ilo de nerezignebla daŭropoveco. Esperanto povas esti decida helpilo en la kreado de pli granda sociala justeco kaj ekologia sekureco. Ĉisence ĝi povas esti tre aktiva parto en la globaligo de paco, demokratio kaj Homaj Rajtoj.

1. FUNDAMENTO
   (universale interkonsentebla)
   1.1 Paco
   1.2 Demokratio
   1.3 Homaj Rajtoj

   efektivigas / garantias

2. BAZAJ KRITERIOJ
   (science kontroleble esencaj)
   2.1 Sociala Justeco
   2.2 Daŭropovo (Agado kaj Instalaĵoj)

   efektivigas / garantias

3. ĈEFAJ ILOJ
   (nedifekt –em- aj pro si mem)
   3.1 Regenereblaj Energioj
   3.2 Separtia kaj Senlika Impostado
   3.3 Neŭtrala Internacia Lingvo (Esperanto, ILo)
   3.4 Primateriala Ŝparemo
   3.5 Neŭtralaj Sciencaj Kontrolinstancoj, ktp.

La poziciigo de Esperanto (ILo) en strukturo kaj dinamiko de sociale kaj biosfere adekvata globaliĝo.

ESPERANTO (Internacia Lingvo, ILo)

= imanente preventi(iv)a, t.e. daŭropova, koncerne de


kvalito,
t.e. daŭropovo el si mem
pro konstruado de inter-etna, -nacia, -kultura informado-kompreniĝado sur minimuma da egoismoj (riskoj) sen perdo de memidentoj, t.e. aktiva neŭtraleco per demokratia dulingveco

kaj de

kvanto,
t.e. daŭropovo el si mem pro reduktado de inter-etna, -nacia, -kultura informado-kompreniĝado je ĝia esenca minimumo sen perdo de (lingva) kompetento, t.e. aktiva maldisipado per primateriala ŝparpovo.

La daŭropov(ec)o den Esperanto kiel imanenta preventilo de la noosfero.

BLANK ~ NIGRE



DIALOGOJ KUN MIA EDZINO
(kaj boparencino mia)

Ŝi Mi ne scias, kial vi neniam volas akompani min kaj viziti mian kuzinon. Ŝajnas, ke vi ne volas aparteni al mia familio.

Mi Nu, vi venkis, hodiaŭ mi akompanos vin kaj ni vizitos vian kuzinon, eĉ se mi enus kvazaŭ rano en garaĝo.

Ni iras al ŝi, ni frapas la pordon kaj aperas la fama boparencino mia, kaj mia (nia) kuzino, rimarkas, kio okazas hodiaŭ, ke vi venas min viziti?

Mi Okazas nenio, nur ke mia, ĉi tiu sinjorino (mia edzino) tiom insistis, ke mi ne povis diri ne, ĉar ŝajnas, ke nia geedziĝo troviĝis en danĝero, kaj kion fari en tiu situacio? Do, obei kaj vivi feliĉaj.

Mi Ni trairis koridoron, post de nia kuzino. Kiam subite mia edzino diris. Inés (estis ŝia nomo), ŝajnas, ke vi iomete lamas. Patrino mia, kion diris mia edzino. Ŝi en la mem koridoro turniĝis kaj diris: Vi ne scias kiom mi suferas.
Lastatempe la doloroj atakas min (ni daŭrigis la vojon ĝis la manĝoĉambro, ni sidiĝis) kaj nia kompatinda parencino rekomencis la temon de la doloroj de la malsanoj. Bedaŭrinde, mi ne estas kuracisto kaj mi ne povas priskribi detale kaj kompetente la amason da malsanoj, kiuj ĉiutage atakas mian kompatindan boparencinon. Reŭmatismo, sukero en la sango, sangopremo, la reno, la stomako ne ĉiam funkcias bone... sekve ŝi iris al ŝranko kaj eltiris kelkajn ok aŭ dek skatoletojn, kiuj enhavis diversajn pilolojn, kiujn ŝi devas, nepre, engluti ĉiutage.
Kredu, karaj geamikoj, ke mi jam komencis senti min, kvazaŭ malsana. Nu, la parencino Inés, iomete haltis, ne parolis (mi pensas, ke ŝi havis bezonon spiri) kion multe dankis miaj oreloj. Sed jen ke subite komencis paroli mia edzino.

Ŝi Jes, mi estas iomete pli juna ol vi (pri la aĝoj de ambaŭ mi silentos), sed doloroj ne mankas ankaŭ al mi precipe en la genuoj, piedoj, kaj eĉ mi havas iomete da sklorozo. Mia edzino, kiu ankaŭ estas esperantistino ne multe komprenas pri la akuzativo (tikla afero, ĉu?), sed kiam ŝi komencas mencii la nomojn de la diversaj medicinaĵoj kun tiuj strangaj nomoj, la menso aŭ cerbo de mia edzino estas pli

efika ol la Nova PIV. El ŝia buŝo komencis eliri tiuj medicinaj rimedoj por taŭga aplikado, ke mi ne sciis, ĉu mi troviĝas kun mia amata edzino kaj ankaŭ mia amata boparencino, ol en medicina fakultato ĉe universitato.

Mi Intertempe mi silentis, silentadis, kiel tomboŝtono. Mi ne sciis kion diri, eĉ tempon mi ne havis por ion diri, ĉar iliaj paroladoj estis kvazaŭ akvotorento, kiu ĉesas neniam. Do, oportunecon mi ne havis, nek mi ĝin deziris. Krome aŭdante iom paroli pri malsanoj, mi jam iomete malsaniĝis. Ili ambaŭ kvazaŭ puŝitaj pri risorto samatempe demandis al mi. Nu, Luis kion vi diras, kion vi pensas?

Mi Kion mi povas diri ? Jes, mi jam konstatas, ke vi havas multajn malsanojn, sed viaj langoj funkcias bonete. Ĉu vi jam pensis, kio okazus al vi, se vi en povus paroli? Dum vi tiom entuziasme rakontis pri malsanoj, mi cerbumis, ĉu alvoki la kuraciston aŭ la pastron. Ambaŭ protestis pro mia mokado, kaj ili opiniis, ke mi estas ege feliĉa pro manko de malsanoj.

Ŝi Parolis la parencino. Ĉu vi scias, ke Johano mortis ? Li mortis preskaŭ subite, oni diris, ke pro koratako. Li ŝajnis tre sana, sed vi jam vidas.

Ŝi Mia edzino. Vi parolas, pri Johano, sed fakte mi ne scias, kiu li estas aŭ estis, ĉar se li estas mortinta mi jam devas diri, estis, ĉu? Nu, ĉu vi aludas al la edzo de nia kuzino, kiu estis kuzino de la frato de nia avo, kaj kiu verŝajne loĝis en Barcelono? Mi scias ke tiu frato de nia avo havis du filinojn kaj unu filon, sed mi neniam ilin vidis, neniam ilin mi konis persone.

Ŝi La parencino. Ne, tute ne! Kian konfuzon vi havas en via cerbo pri nia familio. Ne, tiu Johano, kiu mortis, estis la edzo de Martina kaj Martina estis filino de nia avo, sed Martina kiel vi jam scias, nur estis filino de la edzino de nia avo, ĉar kiam nia avo edziĝis al ŝi, lia edzino jam havis tiun filinon nomatan Martinan, ŝi estis vidvino. Ĉu vi nun iom komprenas?

Ŝi Mia edzino. Nun mi iom komprenas kiu estis tiu familio, kiu loĝis en la strato Castellet de Terrassa kaj poste ili translokĝis al Francio. Jes, mi jam scias, kiu estis tiu Johano, kvankam denove mi devas diri, ke mi lin ne konis.

Ŝi Mia parencino. Tiu familio, kiu loĝis en Terrassa, en kiu ankaŭ estas

familiano nomata Johano, estas familio devenanta de la edzino de nia avo, ne de la familio de Martina la vivdino, poste edzino de nia avo. Kaj tiu familio al kiu vi aludas fakte havas nenian parencan rilaton al ni kaj nia familio, ĉar mi ripetas devenas de la branĉo de la vivdino.

Mi Vi jam povis kompreni, ke dum tiu familia miksaĵo mi restis senparola, tute senparola, tute silenta, ĉar kiu kuraĝas sin meti en tiu familia diskuto? Ankoraŭ mi ne scias, ĉu ili ambaŭ bone interkompreniĝis, kaj ankoraŭ mi ne scias, ĉu mi bone komprenis tiun –familian miksaĵon-.

Ŝi Mia parencino. Nu, mia boparencino havis grandegan intereson, perfekte klarigi, kiu estis tiu mortinta Johano. Kaj ŝi aldonis. Tiu Johano post la intercivitana hispana milito, kiel multaj aliaj, sciis profiti la "okazon" kaj muntis teksan fabrikon kaj rapide li riĉiĝis. Sed li volis tiom gajni, ke li komencis ludi en la burso kaj ĉion perdis, absolute ĉion.

Ŝi Mia edzino. Jes perfekte, nun mi bone scias, kiu estis tiu Johano, ĉar iam mia patro venis hejmen kun tolaĵoj donacitaj de iu parenco. Jes mia patrino tajloris por mi jupeton, nu, longan jupeton, ne kiel tiuj per kiuj sin vestas la nunaj junulinoj. Fine, ni venis al interkompreno, kvankam al tiun Johanon mi neniam konis persone.

Mi Kaj tiamaniere mi pasigis vesperon en agrabla familia etoso.
Mi jam konstatas, ke vi multe envias min.

Luis SERRANO PÉREZ

Deklaro de La Esperanta Civito okaze de la Iraka Milito

La Esperanta Civito,
kiel politika subjekto esprimita de la Esperantlingva komunumo,

rememorinte,
ke la hodiauaj totalismaj reghimoj, kiel tiu de Sadam Husejn, estas tiel dangheraj kiel la hierauaj, ekzemple tiuj de Hitler au Stalin, kontrau la libero kaj la felicho de la popoloj, kaj ke ili estas nature malamikaj al komunumo kiel la Esperantlingva, portanta la valorojn de libera komunikado, paca kunekzistado, respekto por la etnolingvaj minoritatoj kaj por la Homa digno;
emfazinte,
ke milito estas eksa rimedo, kiu solvas la problemojn de politiko tiel malbone kiel sklavismo povus solvi la problemojn de ekonomiko, kaj ke samtempe pacifismo estas sterila rimedo, se ghi ne taksas prioritata la respekton por la rajtoj de la popoloj kaj de la Homo;

konstantinte
ke la politika deletimigo de Ligo de Nacioj, fare de la agresa strategio de pluraj totalismaj potencoj (nome Germanio, Japanio, Italio kaj Sovetunio en la 1930aj), preludis al la dua mondmilito;

zorgante
pro la fakto ke la sama procezo de delegitimigo startis kontrau UN, ech fare de potencoj kun longa demokratia tradicio, nome la anglosaksaj;

invitas
chiun Esperantianon reaserti sian kosmopolitan identecon, super la falsaj patriotismoj kaj trans la novaj geopolitikaj dividoj, kiuj povus esti aparte doloraj en Europo, kaj krome nocaj al la rilatoj inter diversaj civilizoj;

rekomendas
al chiu Esperantiano mobilizi siajn energiojn je la servo de la interpopola dialogo, kontrau la etna kaj religia maltolero, por la disvastigo de kulturo de paco.

La Konsulo
Prof. Dr. Walter Zelazny,
nome de la Senato
de la Esperanta Civito

INTERLINGVISTIKO

J.M.R.H.

FRATER

En la jaro 1957 aperis en la tiutempa Sajgono (hodiaŭ Ho-ĉi-min-urbo) la libro *"FRATER LINGUA SISTEMFRATER, The simplest international Language ever Constructed"* (Frater, lingua sistemfrater, la plej simpla internacia lingvo kreita iam ajn). La aŭtoro de la libro estis la vjetnama PHAN XUAN THAI, kaj laŭ siaj propraj vortoj li deziris kontribui al la konstruado de la tutmonda paco pere de la ellaborado de nova internacia lingvo, nomita *Lingua Sistemfrater* (la lingvo de la frateco en tiu nova lingvo) aŭ pli simple kiel *FRATER*. Xuan Thai opiniis, ke la adopto de internacia lingvo povus helpi la interkompreniĝon inter la tuta homaro kaj tio evitus la militojn. Tiel, li, ene de la 275 paĝoj de la libro, tradukis tekstojn apartenantaj al ĉiuj religioj, kiel ĉapitro de la Biblio kaj skribajhoj de la religioj Hinda, Sintoisma kaj aliaj, kaj ankaŭ la traduko de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Laŭ la vortoj de Xuan Thai, persono kun sufiche ampleksa kulturo bezonus tri monatojn por lerni la novan lingvon, kaj aliaj personoj sen sufiĉaj stud-kapabloj, ne pli ol 6 monatoj. Post ĉi tiu unua libro neniu plia aktivigado okazis favore al la internacia lingvo FRATER.

FRATER estas lingvo kies vortaro baziĝas sur greko-latinaj elementoj, tamen ĝia gramatiko ne estas ekzakte simila al eŭropaj lingvoj kaj ĝi posedas orientajn similaĵojn. Kiel en esperanto, FRATER baziĝas sian gramatikon sur reguloj, ĉi-foje 12 anstataŭ la 16 zamenhofaj. Kaj rilate la vortojn, la aŭtoro opiniis, ke ne estis necese posedi grandan memor-kapablon, kaj tiel li adoptis grandan nombron da vortoj bazitaj unu sur la aliaj. Kvankam la celo de la aŭtoro estis prezenti novan projekton de internacia lingvo, laŭ li la plej simpla ĝis tiam kreata, li pensis, ke lia lingva sistemo devus esti unuafoje adoptata de la orientaj komunumoj (ĉinaj, japonaj, vjetnamaj...), ĉar la gramatiko estus pli facile komprenebla por tiuj popoloj.

GRAMATIKO.-

Alfabeto.
a-b-d-e-f-g-i-j-k-l-m-n-o-p-r-s-t-u
la sonoj de ĉiuj literoj estas similaj al tiuj de esperanto.

Artikoloj.
Simple ne ekzistas, ĉu difinitaj, ĉu ne-difinitaj. Do, LA ne ekzistas.

La nomo, la adjektivo, la verbo kaj la adverbo havas similan formon. Do,
Infan es mikro = La infano estas malgranda.
Domstudi infan es grana = La infana lernejo estas granda

Vidu, ke en ambaŭ frazoj la vorto *INFAN* povas signifi ĉu "infano" ĉu "infana".

Personaj Pronomoj:

Mi : *mi*	Ni: *mis*
Vi: *ni*	Vi: *nis*
Li : *ili*	Ili : *ilis*
Ŝi : *ili*	Oni : *antrop*
Ĝi : *ili*	

Posesivaj :
ot mi, ot ni, ot ili.....
(de mi, de vi, de li...)

Mia domo : *dom ot mi*

Verboj:
ili estas tre simplaj, ni vidu la verbon VIZITI = *visit*

As-tempo :
mi vizitas : *mi bisit*
vi vizitas: *ni bisit.....*

Is-tempo: verbo + *past*
mi vizitis : *mi bisit past*
vi vizitis: *ni bisit past...*

Os-tempo: verbo + *futur*
mi vizitos : *mi bisit futur*
vi vizitos: *ni bisit futur....*

Us-tempo: verbo + probable
mi vizitus: *mi bisit probable*
vi vizitus: *ni bisit probable...*

U-tempo : kiel la infinitivo
vizitu min morgaŭ : *bisit a mi saftra !*

Numeroj :

1 : uni 2 : bi 3 : tri 4 : kuadri
5 : kuinti 6 : ses 7 : sep 8 : okta
9 : nona 10 : deka 11 : dekauni
12 : dekabi 13 : dekatri
20 : bideka 25 : bidekakuinti
30 : trideka 40: kuadrideka
100: senti 187: senti oktadeka sep
1.000 : mil
1.000.000 : milion

3.571 :
trimil kuintisenti sepdeka uni

Demandoj :
por formi la demandojn oni uzas nenian specialan vorton, nur oni ŝanĝas la ordon subjekto+verbo. Por demandi oni uzas verbo+subjekto-n.

Ĉu vi vizitis hieraŭ lian domon?
Bisit past ni bsera dom ot ili ?
Jes, mi vizitis lin hieraŭ.
Ia, mi bisit past a ili bsera.
Ne, mi ne vizitis lin hieraŭ, tamen mi morgau deziras viziti lin.
Ne, mi ne bisit past a ili bsera, promulti mi desira bisit a ili saftra.

EKZEMPLOJ

La lernejo de la infanoj estas malgranda.
Domstudi ot infan es mikro.

Ĉu nia ĉambro estas granda?
Es saber ot mis grana?

Li ĉiam deziras oferi belajn aĵojn.
ili temtuta desira don stof balormaga

(en la lingvo FRATER la adjektivo ĉiam sekvas la nomon).

Tri amikoj miaj vizitos iam vian landon
Tri filo ot mi bisit futur geo ot ni jurbel.

Kiam vi estos en via hejmo kun li?
Kantem es futur ni in dom ot ni kon ili?

PRAKTIKU VI MEM

Mi vizitos vian domon

(~~mi bisit futur dom ot ni~~)

Kiam li estis en mia lando?

(~~Kantom es past ili in geo ot mi?~~)

Mia bona amiko ĉiam deziras helpi min.

(~~Filo bon ot mi temtuta desir asista a mi~~)

ili es past in geo ot ni bsera

(~~li estis en via lando hieraŭ~~)

Me ne es infan

(~~mi ne estas infano~~)

VORTARO

Abrikoto: *abriko*
Al: *a*
Alfabeto: *asura*
Aĵo: *stof*
Ami: *obliga*
Amiko: *filo*
Antaŭ: *ante*
Aŭ: *o*
Baldaŭ: *antetem*
Bona: *bon*
Ĉambro: *samber*
Ĉi tiu: *dis*
Ĉiam: *temtuta*
De: *ot*
Deziri: *desir*
Domo : *dom*
Doni : *don*
Dum : *dura*
En: *in*
Granda : *grana*
Helpi: *asista*
Hieraŭ: *bsera*
Infano: *infan*
Infanaro: *infanmulti*
Inter: *inter*
Jes: *ia*
Kiam: *temkia*
Kie: *plaskia*
Kial: *prokia*
Kiel: *kak*
Kiom da : multimetri
Kaj: e
Kun: *kon*
Lernejo: *domstudi*
Leĝo: *lega*
Malpli: *plusne*
Multa : *Multi*
Morgaŭ: *saftra*
Ne: *ne*
Nun: *temdis*
Nur: *uni*
Malgranda: *Mikro*
Ofte: *temmulti*
Paco: *pasi*
Per: *per*
Poste: *anteno*
Proksima: *ad*
Pli: *plus*
Sed: *sed*
Sinjoro: *sefal*
Lando: *geo*
Tuta: *tuta*
Tempo: *tem*
Tiam: *je*
Sur: *sur*
Tablo : *mensa*
Se: *si*
Veni: *aribe*
Sub: *sub*
Sur: *sur*
Poste : *poste*
Viziti : viziti
Trovi : *eureka*

Daurigante nian am-vortaron, memoru ke se Vi, trovas amaton aŭ amatinon parolanta la lingvon FRATER, Vi devos diri al li / ŝi:

ME OBLIGA A NI

Bibliografio pri la lingvo *FRATER:*

- PHAM XUAN THAI, "*FRATER (LINGUA SISTEMFRATER): The Simplest International Language Ever Constructed*", 1957, Sajgono.

Ofte, la redakcio de *Gazeto Andaluzia* ricevas inform-petojn pri nia rubriko INTERLINGVISTIKO. Por informi al ĉiuj eblaj interesitoj pri la lingvoj ĝis nun pritraktitaj, jen kompleta listo:

VOLAPÜK (n-ro 54)
SOLRESOL (n-ro 55)
NOVIAL (n-ro 56)
OCCIDENTAL (n-ro 57)
LATINO SINE FLEXIONE (n-ro 58)
IDO (n-ro 59)
UNITARIO (n-ro 60)
RO (n-ro 61)
INTERLINGUA (n-ro 62)
NEO (n-ro 63)
GLOSSA (n-ro 64)
LING (n-ro 65)
PICTO (n-ro 66)
VIKTO (n-ro 67)
AUXIL (n-ro 68)
PANROMAN (n-ro 69)

Se al Vi interesas ĉi tiu rubriko kaj mankas al Vi la paĝoj dediĉitaj al unu aŭ kelkaj el tiuj help-lingvoj, ne hezitu peti ilin en la jenan adreson:

Sekcio INTERLINGVISTIKO
GAZETO ANDALUZIA
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

esperanto14@supercable.es

PAĜOJ PRI NIA HISTORIO

La unua Ilustrita Vortaro de Esperanto.-

La unuan Plena Vortaro de Esperanto eldonis la asocio SAT en la jaro 1931. Kiam en la jaro 1947 tiu asocio aperigas jam la trian eldonon oni sciigas oficiale, ke post malmultaj jaroj aperus novan kompletan vortaron, sed ĉi-foje vere ilustrita. La estraro de SAT komisiis al la kordova arkitekto Francisko AZORIN, kiu tiutempe loĝis ekziliita en Meksiko, la ilustrigon de tiu nova vortaro. Francisco AZORIN redaktis kelkaj jaroj antaŭe, ekzakte en la jaro 1932, la libron *Universala Terminologio de la Arkitekturo, Konstruo kaj Arto*, kaj precipe tiu verkaĵo devus esti la modelo por la eldono de la nova kompleta vortaro de SAT, ĉi-foje vere ilustrita.

Tamen, AZORIN laboris ne nur en la ilustrado de la vortoj aperuntaj sur la vortaro sed ankaŭ eĉ en la kompilado de la vortoj kiuj aperus en la verko. Tiel, SAT, al kiu apartenis la kopirajto de la verko, malrajtigis tiun laboron de AZORIN kaj komisiis al Profesoro Gaston WARINGHIEN la redaktado de tiu libro kiu en la jaro 1970 aperus sub la titolo *Plena Ilustrita Vortaro*, kvankam aperis sur ĝi neniu bildo.

Malgraŭ la opozicio de SAT, la kordova arkitekto daŭrigis la kompiladon de la vortaro. La bazo de lia laboro estis la *Plena Vortaro de Esperanto*, eldonita antaŭe de SAT, tamen al tiu vortaro li aldonis vortojn kiuj estis uzitaj de prestiĝaj esperantistoj. Li kreis grupeton da lingvistikistoj kiuj kunlaboris en tiu monumenta verkaĵo, inter aliaj Donald BROADRIBB, J. F. BERGER, Elisa CAETANO, F. POSTNIKOV, M. SABAGG, kaj aliaj.

La unua volumo de la nova verko, kiu aperis sub la nomo *Ilustrita Vortaro de Esperanto* en la jaro 1955, enhavis la vortojn inter la literoj A-K. Franciscko Azorin eldonis tiun libron pagante li mem ĉiujn kostojn. AZORIN eldonis sian vortaron 15 jarojn antaŭ la poste aperunta *Plena Ilustrita Vortaro.* Tamen SAT ekigis kampanjon kontraŭ tiu nova verko sub la akuzo, ke la aŭtoro kreis aŭ modifis grandan nombron de vortoj en la internacia lingvo, kaj tiel la asocio SAT atingis, ke la Akademio de Esperanto malkonsilis en la jaro 1956 la uzon de tiu nova vortaro, konsiderante, ke multaj el la oficialaj radikoj de la Fundamento aperis en la vortaro de Azorin kun modifoj, ke li kreis novajn vortojn aŭ ke li konsideris kiel sufiksojn aliajn konsiderataj kiel ne-oficialaj.

En la jaro 1956 AZORIN partoprenas en Kopenhago (Danio) en la 41a Universala Kongreso de Esperanto, por eviti la bojkoton de la Akademio de Esperanto kontraŭ sia verko. Li opiniis, ke SAT deziris neniun konkurencon kontraŭ sia nova eldonota *Plena Ilustrita Vortaro*, kaj pro tio ili deziris nuligi sian laboron. Kompreneble, ĉi tiu ne estas loko por

juĝi ĉu la laboro de AZORIN estis korekta aŭ ne, tamen ni konsideras, post tralegi ekzempleron de la *Ilustrita Vortaro de Esperanto*, kaj tiu de *PIV*, ke preskaŭ la 50 procento el la vortoj adoptitaj de AZORIN aperis ankaŭ en la posta *PIV*, malgraŭ la praaj kritikoj de SAT. Krome la recenzo aperigita sur la revuo ESPERANTO n-ro 605 aprilo 1956 de William AULD, laŭ kiu oni ne devis aĉeti la libron ĝis la definitiva opinio de la Akademio de Esperanto, ne estis tre korekta, ĉar recenzisto devas laŭdi aŭ kritiki verkon, tamen neniam konsili aŭ malkonsili la aĉeton de tiu libro. Krome, al la recenzo de William AULD la estraro de la UEA aldonis noton sciigante, ke en la revuo oficiala de la E-movado aperus nenian propagandon de tiu verko. Ekde tiu momento la plej altaj instancoj de la E-movado kondamnis la verkon de AZORIN, kiu ne sukcesis disvendi sian libron, eĉ ne minimuman parton de la stoko. Tial, li devis forlasi la eldoni la duan parton de la libro, kun tiuj vortoj inter la literoj L kaj Z.

Kompreneble, ĉi tiu ne estas taŭga loko por defendi la valoron aŭ ne de la Vortaro de Francisco AZORIN, tamen tio kio ja oni povas certigi estas la fakto, ke li proponis uzojn kaj elementojn kiuj poste estus akceptitaj de la normala uzo de la lingvo aŭ de la aperunta *Plena Ilustrita Vortaro*. Bedaŭrinde oni povis realigi neniun seriozan kaj valoran studon pri tiu vortaro, kaj tio ŝuldiĝis al la fakto, ke la nova vortaro estis tuj malaperigita el la E-katalogoj kaj eĉ de la libroservoj de la kongresoj.

Multaj jaroj poste, en 2002 ni ĉiuj ĝojiĝis pro la apero de la Nova *Plena Ilustrita Vortaro* de Esperanto, tio estas, vortaro kie aperas bildoj por faciligi la komprenadon de la vorton. Tamen, oni ne devas forgesi, ke jam en la jaro 1956 kordova esperantisto, kiu tragike devis loĝi ekziliita en Meksiko post la hispana milito, jam eldonis proprakoste valoran Ilustritan Vortaron de Esperanto.

Venontnumere .....

la 42a Hispana Kongreso de Esperanto en Malago (julio 1982)

Historia Arĥivo de la Andaluzia
Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba

Je la servo de la historio de Esperanto en Andaluzio.

POEZIA ANGULO

La elitoj kantas (spirigante kadavrojn)

Kiam mi alvenis
estis mortinta io kaj io
kaj ne antaŭvideblis fino
de ĉi kontraŭaĝa programo.

La elitoj kantas.
Jen siaj feliĉomaŝinoj,
la vaserĉsistemoj,
la dereguligaj aŭtomatoj,
la gematerialkonserviloj.
Merkato unudirekta.
Ĉitieaj la plusvaloroj,
eksteren la monon.
Marŝi por kapitlismo,
profitante la socialan pacon.
La polusoj degeliĝas, sed
la akvo ankoraŭ ne algorĝiĝis.
La merkata fundamentismo
de globaligo funkcias.
La elitoj kantas.

Kiam mi envenis
estis gedemokratoj, kiuj
ĉe laktoproduktoj kaj profesie
ĝisfosadis hedonismon.

La elitoj kantas.
Lingvo kiel gravedeme
malferma datenoamaso.
La nova harmonio
pro sekreta aŭskultado.
Poste resti aŭ iri, intenic.
Vastdise ĝui. Piedvolanludi.
Kaj la ho-aĵoj : propremo,
komunemo, daŭropovo, justeco...
La limba sistemo taksas.
Jen onteco en originala
kartono de anteco !

la individua fundamentismo
de globaligo funkcias.
La elitoj kantas.

Kiam mi revenas
estas 2003 kaj en la realo
fariĝas konsekvence plennuda
la televide insinuita.

La elitoj kantas.
Ventetas deoceane
kaj apenaŭ eblas ignori
la diverslingvecon dum
trudiĝas... la fremda.
Esperanto kontinuas esti
kulturo kun manko
de postula stetika gusto,
ho! kaj eĉ pli: Mankas
subjektiva bezono kiel
objektiva fenomeno...
Tamen kulto kaj kulturo.
La lingva fundamentismo
de globaligo funkcias.
La elitoj kantas.

"Lupiro el Anavalo kaj Kesado"
NULA HORO de Don Mail.

ANDALUZIA KUIRARTO

Torrijas

La *torrija* (prononcu toriha), estas tipa andaluza dolĉaĵo ellaborata dum la Pasko. El Andaluzio la kutimo ellabori la *torrija* profitante la malmolan panon, pasis al la tuta Hispanio, kaj tiel ekzistas diversaj manieroj ellabori ĝin.

Post finiĝi la Pasko, ni prezentas ĉi tiun recepton laŭ la maniero ellabori ĝin en la sevila vilaĝo Carmona.

Jen tio kio estas bezonata:

- Pano, prefere tiu pano kiu utilas por prepari sandviĉojn. Uzu la panon de la pasinta tago.
- Botelon da dolĉa malaga vino.
- Ovoj.
- Mielo.
- Akvo.
- Oleo.

Jen farado:

Oni miksiĝas la vinon kun la akvo. Metu la panon en tiu miksaĵo de vino kaj akvo. Poste tiun saman panon ensorbigu en la ovojn, kompreneble antaŭe kirlu la ovojn.

La panon, ensorbigita de vino, akvo kaj ovo, oni devas frikti.

Preparu poton, en la poto verŝu la mielon kaj ekfluigu la mielon sur fajro. Oni verŝas tiun fluigitan mielon en teleron.

Ĉiun pecon da pano (memoru, ke la formo de la peco similas al tiu de la pano de la sandviĉoj) oni ensorbigas en tiu fluigita mielo.

Kiam la pano kaj la mielo malvarmiĝas, oni povas gustumi teleron kun aro da *torrijas*. Bonan kaj dolĉan Apetiton.



Se Vi deziras kunlabori kun ĉi tiu branĉo de la revuo sendante tipajn andaluzajn receptojn, ne hezitu fari tion.

Kontaktu kun ni:

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 Córdoba

F L A M E N K O

Juan Agustín HERNÁNDEZ VARGAS, pli konata kiel *Juan Talega*, naskiĝis en la sevila vilaĝo Dos Hermanas en la jaro 1891. Profesie, li estis akordigisto okaze de pribestaj negocoj, profitante nur la familiajn aŭ amikecajn renkontiĝojn por kanti.

La fama kantisto Antonio MAIRENA aŭdis lin kaj tuj li invitis al Juan TALEGA kanti antaŭ la publiko, tio okazis meze de la 50a jardeko. En la jaro 1959 li atingis la unuan premion en la Nacia Flamenk-Arta Konkurso okazita en Kordovo, en la branĉoj "Tonas, Siguiriyas y Soleares".

Juan TALEGA estis granda majstro rilate la kantaĵojn de la Triana kvartalo. Li, kiel cigano, nutris sian arton kun la plej profundaj kaj dramatikajn spertojn de sia popolo, kaj poste, li disdonis tiun popolan saĝecon al tiuj kiuj deziris konis la veran flamenkan kantadon laŭ la antikva stilo, t.e. ĉe malgrandaj renkontiĝoj. Eĉ oni diras, ke ĉe li en Dos Hermanas, li kutime sidiĝis sur seĝo ĝuste antaŭ la pordo de sia domo, kiu similis al katedro de la flamenka arto, kaj tie, kun bastono en la mano por akompani la takton, li kantis kaj aliaj grandaj flamenkaj kantistoj iris aŭdi lin por koni la sekretojn de la plej pura flamenko.

Juan TALEGA partoprenis en malmultaj flamenkaj spektakloj, li preferis, kiel tiuj antikvaj ciganaj



Juan Talega


flamenkaj kantistoj, la familiajn renkontiĝojn. Tamen, li partoprenis en kelkaj el tiuj spektakloj kaj ĉiam man-en-mane kun Antonio MAIRENA. Same, li surbendigis kelkajn vinil-diskojn. En la jaro 1970 li ricevis grandan omaĝon en la Teatro La Zarzuela en Madrido, al kiu aliĝis la plej gravaj intelektuloj de tiu epoko kaj partoprenis la plej gravaj kantistoj kiel Enrique MORENTE, Camarón de la Isla, El Lebrijano, Fernanda de UTRERA kaj la gitaristo Manolo SANLUCAR. Juan TALEGA mortis en la jaro 1971 en sia vilaĝo Dos Hermanas.

ż A quién le contaré yo
las fatiguitas que estoy pasando?
Se lo voy a contar a la tierra
cuando me estén enterrando.
No sé porque será
tanto como te quería
te he tomado un odio mortal.
No quiero querer a nadie
ni que me quieran a mi
quiero andar como las flores
hoy aquí mañana allí.
Yo voy a perder la razón
y cuando hablo contigo
a mi me engaña mi corazón.

TURISMI EN ... *FRIGILIANA*

Frigiliana (prononcu *Frigiljana*) estas vilaĝo en la provinco Malago ĉe la zono L´Akserkio, je 56 kmoj de la malaga ĉefurbo. Por atingi ĝin estas necese marŝi tra la Nacia Aŭtovojo 340 kaj eliri apud Nerja. La urbo situiĝas apud la famaj turismaj marbordaj urboj Nerja kaj Torrox.

La historio rakontas ke jam ekzistis fenicaj sieĝoj en la zono. La eltrovo de kelkaj moneroj pruvas ankaŭ, ke jam en la unua jarcento p.K. ekzistis en tiu loko romia fortikaĵo, de kie venas la nomo de la urbo, ĉar la romianoj konis ĝin kiel *Freksiniusana*, aŭ vilaĝo de Freksinio, nomo de romia gravulo de la vilaĝo.



Blazono de FRIGILIANA

La vilaĝo, tiel kiel ni konas ĝin hodiaŭ, devenas de la araba sieĝo fondita dum la 9a jarcento p.K.. La islamoj nomis la vilaĝon *Fiksniana*. Tie ili restis eĉ post la kristana konkero de la lasta araba regno sur la Ibera Duoninsulo en Granado en la jaro 1492, ankoraŭ tiam la enloĝantoj de la vilaĝo estis maŭroj.

En la jaro 1570, post la ribelo de la moriskoj kontraŭ la kristana reĝo, dum kiu gravega batalo estis tiu de la rokego de Frigiljano, la enloĝantoj estis definitive forpelitaj, kaj la zono estis okupita de kristanoj de apudaj provincoj. Tamen, la nombro de enloĝantoj estis tre malgranda, kaj tiel ĝis la 19a jarcento la nombro da frigiljananoj estis apenaŭ kelkcento.

Hodiaŭ la vilaĝo enriĉiĝis dank´al la forto de la rur-turismo.

<u>Ĉefaj Vidindaĵoj:</u>

- La moriska kvartalo kie stariĝas ankaŭ menhiro datumita 1.500 jaroj a.K.

- La Palaco de Manrique de Lara, ankaŭ nomata "El Ingenio". Tiu nomo ricevis en Hispanio la suker-fabrikoj. En ĉi tiu vilaĝo stariĝas la sola sukerkan-fabriko en Eŭropo. Nuntempe ĝi produktas bongustegan sukerkan-mielon.

- La Preĝejo Sankta Antono, konstruita en la jaro 1676.

- Ene de la antikva kvartalo estas vizitinda la serio de 12 mozaikoj kiuj reprezentas la ribelon, malvenkon kaj forpelon de la moriskoj de Frigiljano.



Desegnaĵo de tipa strato de Frigiljano

Manĝaĵoj.-

La tipaj manĝaĵoj en Frigiljano estas similaj al tiuj de la Akserkia zono. Estas bongustaj la friktita kaprido kun migdaloj. Ankaŭ la omeleto de moruo dum la Sankta Semajno. Dolĉa deserto estas la batato kun sukerkana mielo.




Ĝenerala Vidaĵo de Frigiljano

Ĉefaj Festoj.-

- La majaj krucoj kiujn oni starigas la 3an de majo.

- La festo de Sankta Antono, la 13an de junio, kiam ankaŭ oni memoras la batalon de la Rokego de Frigiljano kaj la malvenkon de la moriskoj.

- La 24an de junio oni festas la "la sanjuaneo", tiam la frigiljananoj organizas kamparan feston.



Tipa strato en Frigiljano


Venont-numere

TURISMI en ...

MOJACAR (Almerio)

MISTEROJ KAJ LEGENDOJ DE ANDALUZIO

j.m.r.h.



Fontano en Jaeno memorigas la legendon pri la Lacerto de la *Malena*.

La Lacerto de la Malena

La plej antikva kaj tipa kvartalo en Jaeno situiĝas ĉirkaŭ la preĝejo de Sankta Magdalena. Tie, la plej antikva legendo de la urbo parolas pri lacerto, kiu estas konata kiel la Lacerto de la Magdalena aŭ pli simple kiel la lacerto de la *Malena*. Ekzistas tri versioj pri tiu legendo, kvankam ĉiuj havas saman bazon, la historio parolas pri, ĉu drakono, ĉu granda serpento aŭ ĉu kiu ajn saŭrio, kiu loĝis apud la akvofontoj situintaj en tiu kvartalo, piede de la monto *Jabalcuz* (pr. Ĥabalkuz´) kie stariĝas la jaena kastelo. Tiu terura besto, krom minaci la enloĝantojn de la zono ankaŭ mortigis la ŝafaron de la paŝtistoj.

Jen la bazo de la legendo. La figuro de tiu lacerto aperas ofte en la ikonografio de Jaeno, tiel tiu besto aperas en akvo-fonto de la magdalena kvartalo kaj ankaŭ sur la faŝado de la katedralo, krome, en preskaŭ ĉiuj festoj de Jaeno aperas la figuro de la lacerto, simile al tiuj drakonoj de la ĉinaj paradoj.

Tamen, ekzistas tri malsimilaj versioj por la fino de lahistorio. Laŭ la unua, paŝtisto mortigis ŝafon, li metis ene de ĝia korpo tindron kaj aspergis la tutaĵon per sango. La lacerto vidis la mortintan ŝafon kaj tuj englutis ĝin, la tindro rapide bruligis la ventron de la lacerto kaj ĝi mortis. Alia rakonto asertas, ke mort-kondamnita malliberulo pruvis mortigi la lacerton, kaj tion li atingis pere de sako de tindro kiun la besto englutis kune kun granda peco da varmega pano, tio bruligis la tindron ene de la korpo de la besto. Laŭ tiu historio, tre simila al tiu unua, la malliberulo demetis la haŭton de la lacerto kaj pendis ĝin en la preĝejo Sankta Ildefonso.

La tria finaĵo estas tre simila al tiu legendo de Sankta Georgo. Laŭ tiu, aperis kavaliero kiu sukcesis blindigi la lacerton pere de sia hela armaturo. La kavaliero fine mortigis la lacerton pere de longa lanco najlita ene de la ventro de la bestaĉo.

Kompreneble, ĉiuj legendoj havas grandan dozon da fantazio, sed ankaŭ reala bazo. La kvartalo Magdalena troviĝas piede de monto, kie abundas la akvo-fontoj kaj ankaŭ siatempe la misteraj grotoj, kie tutcerte loĝis serpentoj kiuj terurigis la enloĝantaron.

KOMERCAJ REKLAMOJ

IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) senpage aperigas komercajn ofertojn, laŭ peto de membro aŭ de alia petanto. Tamen, ĝi ne kapablas kontroli la kvaliton de la ofertoj. Estas la respondeco de komercistoj laŭ kutimaj proceduroj esplori la fidindecon de la ebla nova partnero kaj/aŭ per specialaj teknikoj limigi la riskon.

BeninoDZIDZOME FOO-COAMY fabrikas belajn zonotukojn kaj deziras eksporti ilin al Eŭropo kaj aliaj landoj. Retadreso fdzidzome@caramail.com .

Ĉinio

* Komputila monitoro: 15", 67 USD; 17", (ordinara ekrano) 83 USD, (ebena ekrano) 107 USD; kolora televido: 14", 50 USD, 21", 82 USD; ĉiuj prezoj CIF Hongkong. S-ro WANG Tianyi (Ĉielismo), Verdstela Komerca Kompanio, tel: +86-29-2242215, fakso: +86-29-2232952, rete: informo@komerco.com, komerco@public.xa.sn.cn .

* Ni proponas eksporti jenajn varoj kun bona kvalito kaj favora prezo:
1. Diversaj vestoj: jako, ĉemizo, T-ĉemizo, pantalono, kalsoneto, mamzono, pĵamo, korsaĵo, ktp.

2. Familiaj elektraj aparatoj: televidilo, CD, Video CD, videoregistrilo, magnetofono.

3. Komunikado: telefono, senfadena telefono, mobila telefono.

4. Komputiloj kaj ties garnituro.

5. Nutraĵoj: teo, mielo, kaŝtano, arakido, ginko, lilio kaj ties produktoj. Petu detalajn informojn. Ni ankaŭ volas servi kiel agento en la komercado kun Ĉinio.
Zhang Xuesong, Changtaiguan Gongdiansuo, CN-464193 Xinyang, Henan; tel./fakso: +86-376-8821553, reto deodaro@pub.xaonline.com.

S-ro Donghai Cao, retadreso CAODONGHAI2001@YAHOO.COM.CN, ofertas parafinon, kandelojn, produktaĵojn de kemia industrio, teksaĵojn, vestojn, mielon, ktp.

* Nia prezo (sen pakumo, USD/500g) por verda teo "XINYANG MAOJIAN" klaso: A 184.00, B 110.00, C 74.00, D 43.00, E 30.00, F 22.00, G 15.00, H 2.20,I .60,J 6.10, K 2.00.

Ni ofertas ankaŭ pakitajn teojn en pli ol 10 pakaj formoj. La tarifon ni sendos laŭ via peto. Zhang Xuesong, retadreso turismo@371.net, Xinyang, Henan.

Kongo

S-ro Emilo MALANDA NIANGA, Esperanto-Kultura Movado (EKM), 103 Av. Ngina, Lemba 9, B.P.761, KINSHASA XI, rete: emalanda@caramail.com, por grupo e E-istoj el KONGO serĉas eriozajn eksterlandajn investistojn en:
- agrokulturo kaj bredado;
- transportkomerco pri veturilegoj por varoj kaj pri aŭtobusoj por personoj;
- aĉeto kaj vendado de diversaj artaĵoj;
- starigo de radio-televido-stacio;
- vendado de veturiloj kaj vestaĵoj (eĉ brokantaĵoj).

Niĝerio

Mi estas komerca peranto el Niĝerio, kaj planas baldaŭ viziti Ĉinion. Mia niĝeria ne-esperantista kunlaboranto volas tuj importi paperajn nutraĵajn pak-materiojn (ekz. tia kian oni uzas por hakviandaĵo aŭ rostsandviĉo), kun la nomo de la aĉetonta kompanio presita sur ilin. Kiu interesiĝas? Ankaŭ ĉiumonate ni volas importi la jenajn nutraĵajn aldonaĵojn laŭ la indikitaj kvantoj: senkrema pulvora lakto (ADI ekstra grade) 28.000 kg, sorbic acid 3.000 kg, sodium sulfate 4.000 kg, sodium tripoly phosphate 1.000 kg, creamodan sim veg,. 1.500 kg, instant yeast (dry) 5.000 kg, pimento (ground) spice 100 kg, calcium propionate 750 kg, ground cinnamon 100kg, citric acid (granulated) 700 kg.
Kontaktu: Olubunmi Gabriel OSHO-DAVIES, oshodavies@yahoo.com.

(El *La Merkato*, revuo de IKEF, julio 2002)

La jara membrokotizo al IKEF estas 15 Eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

Kontoj:

ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB, IBAN: BE14 0001 5926 2983)

Perantoj

Internacie: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj@fel.esperanto.be)
Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco@public.xa.sn.cn

Francio: S-ro Fran?ois-Xavier GILBERT, 33, rue LouviSre, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso@aol.com

Germanio: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Böhl (Volksbank Böhl, n-ro 713120, BLZ 66291400), telefono 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun@t-online.de

Hungario: D-ro GETHER Istv n, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani@tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seik", J-185-0014 T"ky", Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama@dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj).

En ĉi tiu lasta paĝo ni pardonpetas al niaj legantoj por la granda malfruo en la redaktado de ĉi tiu numero. Bedaŭrinde okazis ne nur personaj aferoj, sed ankaŭ misfunkcio de komputiloj, kio malebligis la akuratan aperon de *GAZETO ANDALUZIA*. Multegajn Dankojn al ĉiuj legantoj kaj amikoj de la revuo, kiuj kontaktis kun la redakcio por demandi kio okazis kun la numero kiu devis aperi en la monato Decembro. Kaj kompreneble, dankegojn pro Via konsideremo.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas la disvastigon de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro
Prezidanto : Andrés Martín González
Vic-Prezidanto: José Francisco Martín del Pozo
Sekretario: Jesús García Martínez
Kasisto: Julio Herrero Segura
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández
Delegito pri rilatoj kun Blinduloj: Alejandro Iglesias Campos.

Adreso: C/ Armengual de la Mota 33, 4D E-29007 MÁLAGA
E-Adresoj: esperanto@ciudadfutura.com
esperanto14@supercable.es
esperanto@navegalia.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

R Realo

Malgrava hispana monunuo, kvarono de la peseto.

Plena Ilustrita Vortaro (paĝo 906)

La realo estis la unua monunuo komuna en la regnoj de la Katolikaj Gereĝoj. Post la konkero de la lasta islama regno en la Ibera Duoninsulo, tiu de Granado en la jaro 1492, ili ekigis politikon por unuigi, se ne politike ja almenaŭ ekonomie, la regnojn de Kastilio kaj Leono kaj Aragono. Kaj tiel en la jaro 1497 ili adoptis la monunuon "realo" kiel komunan hispanan unuon. La nomo ŝuldiĝas al la deziro de la reĝoj distingi ĝin de la monunuoj produktitaj de la nobeloj, ĉar ĝi estis monero de la reĝoj, t.e. "reĝa", kiu estas la signifo de "real" en la hispana, "realo" en esperanto. Monunuo, kiu naskiĝis post la konkero de la lasta al-andalusa regno.

ESPERANT-LINGVAJ VORTOJ KIUJ, HISTORIE AŬ ETIMOLOGIE, DEVENAS DE ANDALUZIO.